

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W. M. Page, adv., Edinburgh.
E. Archdeacon, gen. sekr. de Tour.Club de France, Paris.
Teo Jung, Köln (Kolonjo).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura redaktoro: Zanon.

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★


ADMINISTREJO:
Köln-Horrem, Reinlando, Germanio.
Germ. poŝtĉeka konto 70865, por Teo Jung, Köln-Horrem.
Manuskriptojn oni skribu sur unu flanko de 1' papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendo aŭ respondo aldonu resp.-kup. aŭ poŝtm. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ.
Bulgario: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofio.
Ĉeĥoslovakio: Otto Sklenčka, Hradec Kralovc.
Estonio: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.
Finnlando: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Hungario: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-11-2, Budapeŝt VI.
Litovio: Paŭlo v. Medem, Smeliu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Polio: Adolfo Oberroiman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Usono: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

JARABONO:
5 dolaroj, 6 guldenoj, 10 svedaj kronoj, 12 ŝilingoj, 12 danaj aŭ norvegaj kronoj, 12 pesetoj, 20 francaj aŭ belgaj frankoj, 30 liroj, 70 flinaj markoj, 70 ĉal. kronoj, 250 hung. kronoj, 600 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj balteaj ŝtatoj pagu 60 germ. mk., Estonio 40 germ. mk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, kiuj estas aĉeteblaj ĉe ĉiu banko kaj monŝanĝejo. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per la ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 8, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvoroniare 15 mk., aŭ rekte ĉe la administrejo Köln Horrem, Germanio, (ĉiu numero banderolita 1,25 mk.).

ANONCOJ
kostas po cm² (kvadracentimetro) 1,50 germ. mk.; ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato ĝis 30% (por abonantoj kaj esp. firmoj kromrabato de 20%). ANONCOJ kostas por 1—2foja enpresoj kaj 25 vortoj la prezon de 5 n-oj de ET, 5 resp.-kup. aŭ 6 germ. mk.; por 3—5foja enpresoj ni kalkulas la duoblon. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto (5 n-oj). — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintoj (ĉelkunsido, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpaga.
En korespondaj anoncoj ni forstrekas ne-necesajn kaj naivajn.

Numero 56. Edinburg, Paris, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas, 30. Okt. Jaro 1921.



Helpu al Esperanta Ligilo!



Harald Thilander
la nuna redaktoro de „Esperanta Ligilo“.

Harald Thilander naskiĝis la 25-an de oktobro 1877 en la paroĥo de Breared en la sveda provinco Halland, kie lia patro estis instruisto en kampara popollernejo. Tre frue li lernis legi kaj skribi, li povis jam flue legi je la aĝo de 4^{1/2} jaroj. Poste li memvole partoprenis la lernadon kune kun la lernantoj de sia patro. Estas nature, ke la patro alligis grandajn esperojn al tiuj ĉi klarvideblaj naturdotoj. Tiom pli sentebla estis la malfeliĉo, kiam la filo en marto 1884 ekmalŝanĝis

Blindaj gesamideanoj soifas je bona legaĵo! „Esperanta Ligilo“ estas korvarmiga sunradio en la nokto de ilia blindeco. :- Helpu, ke ĝi ne mortu!

je skarlatina febro kaj aliaj malsanoj. La blindeco estis kompleta, sed ankaŭ liaj oreloj estis afektitaj, kaj ulceroj aperis diversloke en la korpo, je la manoj, je la kolo kaj sub la brakoj. La surdeco progresis, la aŭdado lom post lom tute malaperis. Tamen per bonaj aŭdiloj li povas interkompreniĝi kun sia edzino.

Mallongtempe antaŭ sia morto la patro decidis prepari la enigon de la knabo en la Eugenia-Hejmo. Li estis konsiderata tro malforta por esti sendata al ordinara blindulinstituto. En la Eugenia-Hejmo li nur havis regulajn taskojn en kristaneco. La ceterajn lecionojn li tamen estis permesata ĉeesti. Dekokjara, li mem energie prizorgis sian edukadon. Dum preskaŭ 12 jaroj li nun la plej grandan parton de la fago estis okupata je la kopiado de lernolibroj pri angla, franca kaj germana lingvoj, ĉiam subtenata de la sama vidanta kamarado. Ankaŭ lerneajn librojn pri fiziko, geografio, geologio, astronomio k. a. li transskribis en Braille-an skribon kaj ĉiujn diktis al li la vidanta kolego.

Ian tagon, en 1899, venis al li la direktorino de la surdomutula instituto plena je entuziasmo, metis antaŭ lin tabelon de pronomformoj en la nova tutmonda lingvo Esperanto, kiu aperis tiutempe, kiam Volapik pereis pro sia artefariteco. Sed Thilander nur ridis pri Esperanto, kiu ne povus fariĝi tutmonda lingvo. Pasis tuta jaro, antaŭ ol li dediĉis al Esperanto ree seriozan penson, kaj la kaŭzo de tio, kiel de multaj aliaj gravaj okazintoj, estis hazardaĵo. Li havis en la Eugenia-Hejmo kamaradon, kiu estis fervora ano de la

mondlingva ideo kaj kiu sin okupis tiel per Volapik kiel per Esperanto. Unu matenon li aŭdis tiun ĉi legi la sekvantan version:

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko,
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Thilander petis la kamaradon relegi vorton post vorto. Kaj, mirindaĵoj, li komprenis ĉiun vorton kaj ekkriis: „Ho, kiel facila estas la itala lingvo“, sed la kamarado, kiu sciis, ke Thilander malsatis artefaritan lingvon, rediris: „Esperanto, mia maljunuleto!“ Nun Thilander tuj ekstudis la novan lingvon, kaj amikemaj homoj havigis al li la bezonajn lernolibrojn. Komparate je liaj antaŭaj studoj, tiu ĉi estis ludo, sed li neniel rigardis ĝin kiel ludon, ĉar nun li komprenis, ke li estis trovinta la tiel longtempe serĉitan internacian lingvon de la blinduloj. Poste ja komencis la propagando, kiun nia samideano s-o Merrick priskribis sufiĉe detale (bv. legi la koncernen artikolon en dua porblindula numero en novembro).

En 1903 Thilander ekkonis f-inon Karin Höjer, blindan muzik-kaj kantinstruistino, akademi edukitan. Ŝi multe faris por instigi influajn personojn je lia favoro, por, se eble, helpi lin trovi ian okupadon, per kiu li povus sin vivnutri. Intertempe liaj korespondadoj kaj liaj oftaj petoj je permeso eliri el la azilo lom post lom tiel laciĝis la direktorinon, ke ŝi mem deziris lian forlason de la azilo. Kun monsubteno de 600 kronoj por la unua jaro kaj de 300 por la dua jaro li do, en 1906,

forlasis la Eugenia-Hejmon. Poste li aĉetis presmaŝinon kaj komencis presi relieffajn librojn. Post la morto de la redaktoro de la sveda ĉiusemajna gazeto Thilander fariĝis ĝia redaktoro en 1909. Intertempe la presejo de Thilander kreskis, kaj li nun havas tri kunhelpantojn kaj kunhelpantinojn, kiuj laboras ĉe li, ĉar li ne nur presas kaj redaktas la svedan ĉiusemajnan gazeton kaj „Ligilon“, sed ankaŭ presas tri aliajn punkt gazetojn kaj librojn en sveda kaj esperanta lingvoj. Menciinde ankoraŭ estas, ke Thilander per la eldono de „Esperanta Ligilo“ gajnas nenion, sed ankoraŭ perdas monon. En 1919 nia kara Thilander edziĝis kun f-ino Höjer, fervora esperantistino kaj sekretarino de nia „Ligilo“.

Estu li feliĉa kaj laboru ankoraŭ longe por nia kara lingvo je la bono kaj beno de la tutmonda blindularo! Tion donu Dio!

J. Kreitz.

„Esperanta Ligilo“ kaj la esp. movado inter blinduloj post la milito.

(Pri la esp. movado inter blinduloj s-o W. Percy Merrick bonvolis skribi por ET detalan kaj tre interesan historian skizon, kiun ni — kvankam la hodiaŭa numero estis projektata kiel speciala numero por „Esperanta Ligilo“ kaj la esp. movado inter blinduloj — tamen devas prokrasti al dua porblindula numero, ĉar ni ne rajtas dediĉi la tutan lokon en unu numero al unusola temo. Tial ni publikigas hodiaŭ nur la biografion de s-o Thilander kaj la historion de „Esperanta Ligilo“ kaj de la esp. movado inter blinduloj de post la fino de la milito, verkitajn de nia fervora blinda samideano Joseph Kreitz.)

Tuj, post kiam la milito ĉesis, s-o Thilander kaj liaj amikoj energie laboris por ree eldoni nian internacian gazeton. 1919 oni aperigis tri okazajn numerojn kiel ĝojgajn salutojn de tri nacioj al la blindularo. La unua venis de Skan-

La tri Fundamentaj Reguladoj.

La unua el la du plej urgaj taskoj de la esperantologio.
De Eugen Wüster.

(Daŭrigo.)
Ĉar pri tiuj primitivaj kunmetaĵoj do ne ekzistas malfacilaĵoj, ni havas ĉi tie la aferon nur kun ne-primitivaj kaj sp-e, ĉar el tiuj la substantivoj bezonas apartan priirakton (en la III-a parto), kun la neprimitivaj adjektivoj (reg-a, bril-a) kaj verboj (regi, rapidi). Ĉar ĉe ili la finaĵo ne estas ideo pleonasma, do ĉar la ideo entenita en la finaĵo ne estas elasebla, la forportiganta finaĵa ideo devas konservi ian lingvan signon, t. e. ankaŭ post la forlaso de la finaĵa loko esti reprezentata de la vortelemento.

Ekzistas por tia signigo de la finaĵa ideo tri rimedoj, el kiuj la dua kaj tria estas praktike preskaŭ egalvalora, t. e. egale bone uzebaj: 1. uzo de la analiza formo, 2. la internvorta konservo de la finaĵo, 3. la procedo laŭ la fundamenta Propozicio de pluformado.

1. La uzo de la analiza formo konsistas en tio, ke volante esprimi ekz-e la ideon igi*) ŝtat-a (aŭ reg-a) resp-e bril-a kaj igi ferment-i (aŭ reg-i) resp-e rapid-i oni rezignas havi por ĝi unu vorton kiel G ver-staatlich-en resp-e glänz-en, kaj ver-gären (resp-e antreiben), sed kontentiĝas jam pri grupo da vortoj, en kiuj la ordo de la memstaraj vortoj kompare kun ilia ordo en respektiva unuvorta aŭ sinteza formo (kiel G) estas renversita. Estas evidente, ke tiu speco de pluformado estas tre limita, ĉar oni eble ankoraŭ povas diri igo ŝtata

resp. igo brila, sed jam ne iginto ŝtata resp. igilo brila ktp.; alivorte, ĝi ne estas ĝenerale aplikebla.

Ke tamen tia ĝenerale aplikebla pluformadilo estas ne malhavebla, montriĝas ankaŭ per tio, ke oni, anstataŭ okupi sin pri la fundamenta problemo, enkondukis specialajn radikojn por pluformitaĵoj de ideoj jam signohava: ekz-e lokalizi (oni ankaŭ trovas — en la Plena Vortaro — lokal-igi!) por igi lok-a kaj centralizi por igi centr-a. Ni do turnu nin al la ĝenerale aplikeblaj rimedoj de pluformado:

2. La dua procedo estas konservi la finaĵon ankaŭ interne de la vorto. Oni do havus ŝtata-igi aŭ ŝtataigi kun ŝtataigo (G Ver-staatlich-ung), ŝtataiginto (G Verstaatlicher) ktp.; same brilaigi kun brilaigo (G Glänz-ung), brilaigilo (G Glänze); fermentigili kun fermentigilo (G Ver-gär-ung), fermentigilo (G Gärungsmittel); pli ĝenerala ol fermento): rapidigili kun rapidigilo (G Antreiben). Oni vidas, ke tiu rimedo jam kontentigas la „praktikan postulon“ por ĉiuj imag-eblaj pluformadoj, ke ĝi permesas pluformadon nelimitan. Tamen ĝin, kontraste kun la rimedo III, malrekomendas

a) la oftaj hlatoj (vokalrenkontoj),
b) ke kontraŭe al la kutimoj de Esp-o (la naciaj lingvoj ne precize diferencigas inter afiksoj kaj finaĵoj) tiam finaĵo estus uzata kiel sufikso, en nefinaĵa loko. En Esp-o tio okazis ĝis nun nur ĉe postsekvo de radikoj, ekz-e en kelkafoje, transversabuŝa resp-e vivukrio, vivipova kaj ĉe kelkaj aŭtoroj en la malpraktikaj (v. sub 3) analogiaĵoj de najlmaŝino.

3. La tria procedo estas bazita sur la fundamenta propozicio de pluformado, t. e. sur la, celantaj nur la ideon, identaĵoj -a = -ec- kaj -i = -ad-.

Tiu rimedo jam estas ĝenerale uzata, kiam temas nur pri postmeto de nova finaĵo post la origina. Tiel la o (= ento, t. e. ĉi-kaze sp-e kvalito) „reg-a“ (v. en la III-a parto) = „reg-a-o“ estas = reg-ec-o, kaj „bril-a-o“ = bril-ec-o (G Glänzend-sein, das Glänzende von). Analogie la o (= ento, t. e. ĉi-kaze ago) „reg-i“ = „reg-i-o“ = reg-ad-o (aŭ ferment-i-o = ferment-ad-o) kaj „rapid-i-o“ = rapid-ad-o.

Por kompletege aldoni po unu ekz-on de -a-i-kaj de konforma -i-a- formitaĵo, ni ĉerpas ekvilibr-ec-i = „ekvilibr-a-i“ = esti ekvilibra (Verax*) kaj sang-ad-a = „sang-i-a“ = (proksimume) sang-anta el d-ro Vallienne, Kastelo de Prelongo (p. 358-a).

Por havi praktikan pluformadilon por -a kaj -i nun sole necesas, ĝeneralligi tiun uzon, t. e. limi ĝin ne nur al la kazo kun postsekvanta finaĵo. Tio, kvankam ne ĝenerala kutimo, ne estas novaĵo, kiel montras trarigardo de la literaturo; ni deziras elĉerpi el ĝi kelkajn ekz-ojn:

Ekz-oj pri -ec- estas karb-ec-igi (Rousseau, Internacia Farmacio, 1911) = igi karb-a kaj la troviĝantaj ĉe Grosjean-Maupin natur-ec-igi = igi natur-a; ole-ec-igi = igi ole-a; plisent-ec-igi = igi pli sent(em)-a; spong-ec-igi = igi spong-a.

Ekz-oj pri -ad- estas ankr-ad-ejo (G.-M., Verax) = „ankr-i-ejo“, ejo, kie oni ankras; kamp-ad-ejo (G.-M., V., A. C. k. a.) = „kamp-i-ejo“, de kiu parta koncept-

*) La kunmetaĵo estas taŭga kiel ekz-o sed en realo estas pleonasma: sufiĉus ekvilibr-i, ĉar Verax donas al ekvilibr- adjektivan karakteron; li tamen ne povis ne formi tiun kunmetaĵon; ĉar li, malekcepte, donis al ekvilibr-i signifon, kiun oni devus esprimi per ekvilibr-igi, t. e. la signifon meti en ekvilibron.

ajo estas tendaro; nombr-ad-ebla*) (de Saussure) = „nombr-i-ebla“, komputebla; sang-ad-igi (d-ro Vall., K. d. P., p. 376-a) = „sang-i-igi“, igi sangi.

Ankaŭ antaŭ radikoj kiel maŝino ni preferus -ad- al -i, ĉar najl-maŝino kaj najl-ad-maŝino ŝajnas al ni (pro malsama la akcento) pli konformaj al la ideo diferenco, malpli facile intermikseblaj ol najl(o)-maŝino kaj najl-i-maŝino; ĉe la uzo alikaze por diferencigi oni akcentus la silabon -i-.

Kontraŭ la ĝenerala procedo laŭ la fundamenta propozicio de pluformado oni povas diri

a) ke multaj esp-istoj, ne post funda esploro de ĉio konsiderenda, al -ec- kaj -ad- aljuĝas substantivan vortkarakteron. Al tio ni respondas, ke ni dum multjara esplorado kaj praktika eksperimentado trovus, ke akcepto de la dirita propozicio renkontas nenialajn teoriajn aŭ praktikajn malfacilaĵojn, sed kontraŭe en ambaŭ rilatoj donas vere brilan solvon; aliflanke plue estus tre nekontentege, havi du vortelementojn, kies ideo estas la jena: aŭ kunmetita el antaŭiranta adjektiva (resp-e verba) kaj sekvanta substantiva ideoj kiel ĉe kvalif-o (resp-e ag-o); aŭ ĉe ambaŭ identa (nur la substantiva), tiel ke la diferenco konsistas sole en malsama laŭ konvencio interelementa rilato al la antaŭiranta vortelemento, nome en tio, ke -ec- supozas la antaŭiron de la adjektiva kaj -ad- de la verba ideo (per kio ekestas la kazo 4a); ambaŭ interpretoj havas la samajn konsekvencojn. Cetere ja ankaŭ Zamenhof aprobis la teorion de Antido, de kiu la dirita propozicio estas esenca parto.

(Daŭrigota.)

*) Ĉi tie -ad- ne estas neceso, v. sub 4a.

dinavio en januaro, la dua el Anglujo en majo kaj la tria el Finnlando en septembro. Dume la skandinavoj kolektis monon, por ke „Ligilo“ aperu denove ĉiumonate, kaj en Anglujo s-o Merrick, unu el la plej eminentaj, plej fervoraj, plej agemaj blindaj esperantistoj, verkis alvokon je la sama celo. Antaŭ ol li sendis la alvokon al la gazetaro, li konsilistiĝis kun Sir Arthuro Pearson, kiu bonkore proponis, ke la ĉefkomitato de la National Institute for the Blind atentu la aferon. La komitato konsentis subteni „Ligilon“ per ĉiujara sumo de ne pli ol 250 pundoj sterlingaj, ĝis ĝi alle decidigis. Klan ĝojegon kaŭzis tiu malavara decido al la legantoj, neniu povas konstati krom tiuj, kiuj tralegis la centojn da dankleteroj el la legantaro tutmonda. Liberigita de financa zorgo, „Esperanta Ligilo“ reviviĝis kaj de post januaro 1920 denove aperis regule ĉiumonate kun 45 paĝoj. La unua, januara numero enhavis, krom kelkaj tre interesaj artikoloj blindulfakaj, ankaŭ rimarkindajn biografiajn notojn pri s-o Carl, la fondinto, kaj Sir Arthuro Pearson, la reviviginto de nia internacia gazeto. La enhavo de „Esperanta Ligilo“ estas tiel elektita, ke ĉiu leganto preskaŭ en ĉiu numero trovas ion speciale interesan por li, kaj s-o Thilander, la redaktoro, estas en la vera senco de l' vorto la ĝusta viro sur la ĝusta loko. Blindulfakaj kaj popularsciencaj artikoloj alternas kun literaturaj, rakontoj kaj spektakloj ofte verkita de blinduloj mem, kaj ĉio estas tiel facile komprenebla, ke la intereso por nia gazeto konstante kreskas inter la blinduloj. Antaŭ la milito „Ligilo“ neniam havis pli ol 360 legantojn, sed nun la legantaro el dudek-ses landoj atingas la nombron 600. Precipe la blindulfakaj artikoloj el „Ligilo“ estas multe ŝataj ĉiamaniere, ke multaj, se ne ĉiuj estas tradukataj en la naciajn lingvojn kaj represataj en naciaj gazetoj porblinduloj. Tial ankaŭ la neesperantistaj samsortanoj havas okazon informiĝi pri la stato de la blindula afero en aliaj landoj, kaj samtempe ili estas instigitaj per tio lerni la internacian lingvon. Dank' al la konsula sistemo, la redaktoro de „Ligilo“ facile povas informiĝi pri la blindula afero en ĉiuj landoj. Estas pli ol 25 konsuloj de la blindaj esperantistoj, kiuj kunlaboras kun la redaktoro. Tiuj konsuloj havas la taskon, unue: kiel eble plej propagandi Esperanton inter slandaj blinduloj; due: kolekti la monon de la abonantoj al „Ligilo“ en sia lando, t. e. la abonantoj anstataŭ sendi la monon al la eldonanto de la gazeto ĝin sendas al la konsulo de sia lando; tric: ili devas doni scilgojn pri diversaj aferoj, kiuj koncernas blindulojn de sia lando, al fremdaj samideanoj, kiuj postulas tiajn scilgojn de ili. Ili estas la ligiloj, kiuj internacie unuigas la popolon de la blinduloj! Grava rolo!

Ankaŭ la ŝakpaĝoj estas restarigitaj. Multan plezuron kaŭzas al la nevidantaj legantoj de nia gazeto la konkursoj diversspecaj. S-ino Annie Mudie, la patrino de la eminenta angla esp. propagandisto mortinta dum la milito per fervoja akcidento, je la memoro de sia filo promesis doni ĉiujare dek pundojn sterlingajn por premioj. Dank' al tiu ĉi malavara donaco „Ligilo“ povas aranĝi dufoje en la jaro tri diversajn konkursojn kun premioj: 1. literaturan, 2. blindulfakan kaj 3. problemsolvan. Krome: iom da mono estas rezervata por okazaj konkursoj ĉiujaraj. La intereso estas tre vigla inter la nevidantaj samideanoj pri tiuj konkursoj, kaj mi kredas kun certeco, ke ĉi tie estas la ĝusta loko por danki tiukore al s-ino Mudie pro ŝia malavara donaco en la nomo de la tutmonda esperantistaro blinda.

Laŭ propono de franca samideano „Ligilo“ malfarmis novan sektion sub la rubriko: „Liberal Korespondetoj“. En ĉi tiu sekcio la legantoj povas prezenti demandojn, rimarkojn aŭ respondojn al demandoj, ne bezonante doni nomon nek adreson,

nur lan ajn markon. Sub la rubriko „Nia Afero“ nia kara gazeto raportas pri la esp. movado inter blinduloj.

Post la milito la intereso pri Esperanto pliiĝis inter la blinduloj ĉiulandaj. Multaj gazetoj naciaj por blinduloj publikigas entuziasmajn artikolojn pri nia lingvo kaj ĝia utilo por la nevidantoj. Precipe la angla gazeto porblinduloj „Progress“ ofte akceptas itajn valorajn artikolojn verkita de nia fervora samideano s-o Merrick, sed ankaŭ alilandaj reliefe presitaj gazetoj volonte publikigas itajn propagandajn artikolojn, kiuj alifras la atenton de la samsortanoj al nia kara lingvo Internacia. En multaj blindulejoj okazas kursoj pri Esperanto. Ekzemple: En Purkersdorf (Aŭstrujo), Praha (Ĉeĥoslovakio), Budapeŝto (Hungario), Frankfurt a. M., Halle a. S. (Germanujo), Woluwe (Belgiujo) kaj aliaj. Kelkaj el la blindulinstitutaj direktoroj multe interesigas pri nia lingvo. En kelkaj urboj estas tiom da blindaj esperantistoj, ke tie estiĝis blindulaj esp. grupoj: Wien, Frankfurt a. M., Erfurt, Manchester k. a. Esperantistaj unuigoj aŭ rondoj ekzistas por blinduloj en Ĉeĥoslovakio, Aŭstrujo, Germanujo kaj Finnlando. Tamen, sendube la plej grava venko de Esperanto inter blinduloj estas la decido de la 7-a aŭstrala „Blindenführerstag“ (24.-27. septembro 1920), kiu unuvoĉe kaj foraplaŭde akceptis la proponon de la vidanta blindulinstruisto Otto Vanecek: deviga enkonduko de Esperanto en la aŭstrajn blindul-lernejojn. Do baldaŭ ĉiuj aŭstraj geblinduletoj lernos Esperanton devige en la lernejoj. Ĝojiga sukceso! Laŭ la propono de prof. O. Vanecek en la statutoj de ekzamenado de taŭĝeco de novaj aŭstraj blindulinstruistoj estas enmetita paraĝrafo postulanta, ke ĉiu blindulinstruisto nepre devas koni Esperanton kaj ne plu francan kaj anglan lingvojn. Ankaŭ la aŭstraj blindul-lernejoj legolibroj poste enhavos legaĵojn pri Esperanto. La aŭstra ekzemplo estas imitinda por ĉiuj blindul-lernejoj tutmondaj.

Same granda sukceso de Esperanto inter blinduloj estis la internacia subkongreso en Praha, al

kiu partoprenis pli ol sesdek nevidantaj samideanoj el 13 naciecoj, sed ne estas mia tasko ĝin priparoli hodiaŭ detale.

Resume mi povas konstati kun plena certeco, ke neniam antaŭe la intereso pri nia lingvo inter blinduloj estis pli viva ol nun. La kuzoj kompreneble estas: la ĉiam kreskanta bezono de tutmonda interrilato ankaŭ inter la nevidantoj kaj la ekzistado de nia kara „Ligilo“, kiu en ĉio prosperis dum preskaŭ du jaroj. Sed en la nuna jaro la malbonega komerco tra la tuta mondo tiom malpligrandigis la enspezojn de la National Institute, ke ĝi absolute ne povis daŭrigi sian malavaran subtenon de nia gazeto. Ĝi eĉ devis, pro manko de mono, ĉesigi multajn el siaj enlandaj bonfaroj kaj plialtigi la prezon de siaj punkte presitaj libroj. Tial la ĉefkomitato kun profunda bedaŭro anoncis, ke de junio 1921 ĝi nur pagos la kostojn de la ekzempleroj por britaj blindaj legantoj. Ĝi limigis la sumon je „ne pli ol 40 pundoj sterlingaj“. Efektive, „Esperanta Ligilo“ ŝuldas multon al la Instituto, kiu ebligis ĝian eldonadon dum la du jaroj, kaj eĉ en ĝia malbonfarto malŝparas sumon, kiu atestas ne nur simpatian kun nia entreprenado, sed fortan deziron por nia sukceso.

Estas nun nia vico sperti la malprosperon ĉiam postlasitan de granda milito! Eĉ por tiu pli malgranda donaco la nevidantaj samideanoj ŝuldas plej korajn dankojn al la Nacia Instituto porblinduloj en London, ĉar ĝi estas proptorie al la enspezoj pli granda oferaĵo ol la antaŭa sumo. Tamen, kiel la blinduloj akiris monon por plinigi la mankon? 210 pundoj sterlingaj ja estas grandega sumo! Generale la nevidantoj estas nericaĵaj kaj krom tio la samideanoj loĝantaj en malbonvalutaj landoj ne povas pagi la saman abonon al „Ligilo“ kiel tiuj el la landoj kun bona valuto. Nia afero estas tiel bone restarigita, ĉu ne la vidantaj samideanoj klopodos pri ĝia daŭrigo, malsubtenante nian karegan gazeton? La danko, jes, la danko tiukora de la tutmonda esperantistaro blinda estas certa al Vil

Joseph Kreiĉ.



La reliefpunkta presejo de s-o Thilander.

Donacoj por „Esperanta Ligilo“ ĝis nun akiritaj.

En nia n-o 53 ni kvitanis la ricevon de 537 gmk. Intertempe alvenis pluaj donacoj:	
17. H. H., Heerlen, Nederl.	20 gmk.
18. G. van Heek kaj H. van Heek, Hengelo, Nederl. (4 1/2 hfl.)	225 „
19. Kalman Papp, Püspökladany, Hung. (10 hkr.)	2 „
20. Generalo Sebert, Paris (10 fr. fk.)	100 „
21. Studenta Esp. Rondo, Berlin-Charlottenburg	10 „
22. Kolekto de Moreno, Marseille Franci. (20 fr. fk.)	200 „
23. H. Sakarias, Tallinn, Est.	5 „
24. La anoj de Est. Esp. Unuigo „Espero“, Tallinn (rezulto de monokolekto farita la 3. 10. 21)	185 „
25. S-ino P. Sing, Zürich, Turnerstr. 14 (3 sv. fk.)	75 „

26. P. v. Medem, Kaunas, Lit.	50 „
27. A. Opulski, Kaunas	20 „
28. M. A. C. Schaafsma, Bevervyk, 200	„
Entute	1062 gmk.
Antaŭa Sumo	537 „
Tuta Sumo	1599 gmk.

PS. En la antaŭa n-o estiĝis eraro pri la monokolekto por „Esp. Ligilo“. Devas esti „pli ol 1000 mk.“ anst. „pli ol 2000 mk.“ Sed ni firme atendas, ke la sukceso de la hodiaŭa numero plinigos ne sole la duan, sed eĉ la trian milon. La diverslandajn monbiletojn ni ne ŝanĝos, sed nur transkalkulos je gmk. laŭ la taga kurzo pro oportuneco ĉe la kalkulado. Forsendante la kolektitan monon al la eldonanto de „Esp. Ligilo“, ni kompreneble forsendos la diverslandajn monbiletojn ne ŝanĝinte ilin.

Al la novaj abonantoj de ET.

Multaj el la novaj abonantoj de „Esperanto Triumfonta“ ne legas la rakonton „La Senlingvulo“. Estas domaĝe, ĉar la rakonto estas tre bona kaj interesa. Estas nur necese, ke oni konu la komencon; tial permesu, ke mi ĝin mallonge rakontos.

El malgranda vilaĝo en la rusa Volin'a gubernio lafoje malriĉaj kamparanoj elmigris al Ameriko, al la lando de „libereco kaj riĉeco“. Malofte oni poste ion atidis pri ili, tial oni ne miris, ke ankaŭ la elmigrinto Osp Lozinski neniam ion aŭdigis. Sed nun tagon venis de li letero al lia edzino, kaj la letero enhavis pagitan bileton por ŝi ĝis lia nova hejmo en Minnesota. La bileto taŭgos por vaporŝipo kaj fervojo, s-ino Katarino Lozinska nur veturu al la germana urbo Hamburgo. Ŝi ploris pro la adiaĉo, sed tamen ĝojis kaj entreprenis la vojaĝon. Du junaj viroj decidigis ŝin akompani. Unu estis ŝia frato, Mateo Timono, viro de grandega kresko, kun blondaj krispaj haroj sur granda kapo — vera arbara urso, sed kun okuloj kaj koro de infano. La alia, lia amiko, Ivano Dima, estis viro de tute alia speco: malaltkreska, malforta, sed gaja, babilema, sprita.

Esperplene la trio forvojaĝis. Sed en Hamburgo okazis malfeliĉo: la du viroj, ne antaŭe prizorginte siajn biletojn ne povis veturi per la sama ŝipo kun Katarina, ili devis ŝin sekvi per alia. Mateo Timono, nia heroo, silenta, meditema homo, multe pensas kaj observas laŭ sia naiva maniero dum la veturado sur la maro. Unu pasaĝero mortas survoje, la kampatema Mateo iĝas protektanto de la juna orfino Anna. En Nov-Jorko ili kompreneble ne retrovas Katarina'n, ili kune loĝas en simpla gastejo. Anna akceptas oficon kiel

servistino ĉe la sinjorino, Mateo entreprenas adiaĉan viziton al ŝi kaj — perdas sian dukanton! Nova, pli granda malfeliĉo! Nun li estas „kvazaŭ kudrilo falinta en polvan ŝoseon“, nur sciante sian rusan lingvon li estas senespere perdita. Li ankoraŭ portas sian blankan kiloton, la rusan kostumon, timeme kaj mallerite li evitas policanojn, kiuj eble povus helpi lin. Nia rakonto priskribas ilajn aventurojn, ĉiu ĉapitro spegulas la bonkoran, simplan karakteron de Mateo, ĉiu ĉapitro estas por si mem komprenebla, ĝi estas vera juvelo, ĉeno da multekostaj, egalvaloraj perloj. La lasta ĉapitro priskribas Mateon vagantan kaj fine ekdormantan en la Centra Parko de Nov-Jorko. Vekiĝinte, li trovis viron sin pendigitan. Je la sama mateno la senlaborulo de Nov-Jorko aranĝis kunyenen en la Centra Parko. Nia lasta daŭrigo en n-o 55 finiĝis per tio, ke almarŝis homamaso kun orkestro al la Centra Parko.

Mi konsilas al ĉiuj abonantoj, ke ili legu ĉiujn haveblajn numerojn, ili sentos veran ĝuon dum la legado. Ankaŭ la stilo de la verko estas bonega, „La Senlingvulo“ iam en libroformo estos trezoro en nia literaturo. Marie Hankel.

Klariga noto: Ĉiu Lozinsko havas la familian nomon „Lozinski“. Por lin diferencigi ĉiu el ili ricevis almonon laspecan.

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

(88-a daŭrigo.)
Mateo atendis tul vidi taĉmenton da soldatoj. Sed kiam la polva nubo venis pli proksimen, li vidis, ke la muzikistaro sekvas, komence enviciginte, poste senorde, polvokovrita homaj figuroj en same eluzitaj jakoj, kun same ĉifitaj ĉapeloj. Antaŭ la multkolora homamaso alie super la kapoj

naĝas kaj balanciĝas standardo, flirtanta super alta platformo sur radoj. Deko da standardistoj moviĝis kune kun la homamaso.

Bruante, frapante, balanciĝante, ĉe la viglaj sonoj de marŝo, sub furioza aklamado kaj fajfado de la atendanta popolo, la standardo alveturis al la fontano kaj haltis kun falintaj faldoj. Nur la rubandoj moviĝadis en la aero, kaj de tempo al tempo la standardo malfaldiĝis, kaj oraj literoj sur ĝi vidiĝis.

Tiam en la homamaso levigis vera tumulto. Unuj vokis la novealvenintojn al la arbo, kie ĵus estis pendinta la memmortiginto, aliaj deziris resti ĉe la fontano. La standardo denove ekbalanciĝis, la platformo ekveturis, ĉirkaŭita de popolo, sed baldaŭ revenis, forpuŝita de densiĝinta taĉmento da policanoj.

Kiam la vento forportis la polvon, la standardo ree fariĝis senmova, kaj sub ĝi staris viro kun malkovrita kapo, kun longaj haroj kaj brilantaj nigraj okuloj de sudlandano. Li ne estis altkreska, sed la platformo plialtigis lin super la homamaso, kaj li havis mirindan voĉon, kiu en nnu momento superregis ĉiujn aliajn voĉojn: Li estis s-ro Charles Hompers, fama oratoro de la Laborista Unuigo.

La homamaso eksilentis, kiam li, etendinte la manon al la arbo, de kiu ĵus estis formelita la memmortiginto, diris nelalte, sed eksterordinare solene kaj klare:

„Antaŭ ĉio ni honoru unu el niaj kamaradoj, kiu hieraŭ nokte falis en la malfacila batalo!“

Super la multemila homamaso kvazaŭ vento ekblovis. La kapoj malkovriĝis kaj dum unu minuto sennombraj ĉapoj vigle moviĝis en la aero. La vento kaptis la faldojn de la standardo, kiu meze de l' tomba silento plaŭdis kun obuzaj kaj malgaja bruoj. S-ro Hompers rekomencis sian parolon.

Urbo Bologna enkondukas Esperanton en komunumaj lernejoj.

La komunuma aŭtoritato de la urbo Bologna (preskaŭ 300 000 enloĝ.), sekve de lertaj klopodoj de adv. Palmeggiani, prez. de loka Emilia Esp. As. kaj delegito-viculo de l' urbestra komisario, ĵus dekretis la enkondukon de Esperanto kiel laŭvola studofako en ĉiuj popularaj komunumaj lernejoj (preskaŭ 100 klasoj). La kursoj komencos la 1. jan. 1922. Dume la sama aŭtoritato estas organizinta oficialan kurson por la preparo de necesaj taŭgaj instruantoj inter la komunumaj instruistoj. Ĝin gvidas d-ro Umberto Toschi.

Post Milano estas do Bologna, la malnova universitata urbo, kies flera devizo estas „Bononia docet“ (Bologna instruas), la dua urbo en Italio oficiale enkondukanta Esperanton en siaj lernejoj. La imitinda ekzemplo de tiel gravaj urboj kuragiĝu ĉiam pli la viglajn samideanajn fortojn de la Itala lando.

Esperanto en Litovio.

Antaŭ ses semajnoj la ruinoj de Siauliai, atestantoj pri la kruela mondilito, estis ornamitaj per grandaj afiŝoj anoncantaj pri esp. leciono kaj esp. ekspozicio. La 19. sept. s-o Gajgilas legis la lecionon litovlingve en plena salono de litova societo „Varpas“. Kurso baldaŭ komenciĝos. La ekspozicio, kvankam malgranda sed bele ornamita de esperantistinoj, faris bonan impreson. Konsiderante la proverbon „Forĝu feron, dum ĝi estas varmega“, ni intencas aranĝi duan ekspozicion en pli granda mezuro. Por ke ĝi estu plensukcesa, ni petas alsendadon de esp. ĵurnaloj, prospektoj, fotografajoj, ilustr. poŝtkartojn ktp. laŭ adreso: J. Zmudskij, iki pareikolavimo, Siauliai, Litovio.

La 16. okt. okazis esp. kunveno en laejo de la litova gimnazio, kies direktoro tre favoras nian movadon.

En urbo Datnovo, s-oj Olsejko kaj Gajgilas malfarmis kursojn ĉe termezura kaj arponomia (?) lernejoj. Ili intencas aranĝi lecionojn kaj ekspozicion ankaŭ en urboj Ponevej kaj Kejdani.

En urbo Jonavo tri junuloj („Verda Steleto“) propagandas Esperanton.

En la ĉefurbo Kaunas (Kovno) baldaŭ komenciĝos novaj kursoj.

Antaŭ nelonge la ministerio por popolklerco konsentis enkonduki Esperanton en popollernejoj. (?)

J. Zmudskij.

Esperanto en Germanio.

Tre ĝojigajn scilgojn enhavas la oktobra numero de „Germana Esperantisto“. Laŭ la statistiko farita per demandoj de GEA, Esperanto estis instruata dum la jaro 1920 en lernejoj de urboj Auebach, Braunschweig, Bremerhaven, Chemnitz, Cöthen, Essen, Frankfurt, Frelburg, Greifswald, Mylau, Niederhermsdorf, Neustadt en Silezio, Plauen, Seb, Stettin, Weinböhla, Werdau, kaj Worms; plue en la popularaj alilernejoj de la urboj Auerbach, Braunschweig, Cöthen, Dresden, Greifswald, Hannover, Hattingen, Leipzig, Nürnberg, Neugersdorf, Oederan, Plauen, Uelzen kaj Weinböhla.

De julio-decembro 1920 la grupo de GEA komencis 70 kursojn kun 1266 partoprenantoj, kiuj finiĝis kun 796 p., kaj 62 kursojn kun 1842 p., pri kies finiĝo ankoraŭ ne ekzistas statistiko. Entute do komencitaj en la dua duono de 1920: 132 kursoj kun 2608 p.

La nombro de la grupoj altiĝintaj al GEA altiĝis de 49 grupoj kun 1132 membroj (1. 7. 1918) kaj 104 grupoj kun 2129 membroj (1. 7. 1920) al 152 grupoj kun 3500 membroj (1. 10. 1921).

Io ektemis en la brusto de Mateo. Li kompreneble, ke tiu viro parolas pri li, pri tiu, kiu en la lasta nokto vagadis en la parko, malfeliĉa kaj senrifugeja same kiel li, Lozinski, kiel ĉiuj ĉi viroj kun kavaj vizaĝoj. Pri tiu, kiun la senkompata urbejo same kiel ilin ĉiujn eljetas ĉi tien, pri tiu, kiu antaŭ kelkaj horoj per stranga obuzua voĉo pri io demandis lin, Mateon... Pri tiu, kiu vagadis ĉi tie kun sia profunda angoro kaj kiu nun jam ne vivas...

Oni povis aŭdi, kiel la vento malforte movetadis la foliaron, kiel de tempo al tempo la standardo balancadis siajn larĝajn faldojn. Dume la parolado de la viro, staranta super ĉiuj kun nekovrita kapo, fluis malgaje, kortuŝe...

Poste li sin turnis kaj etendis la manon al la urbejo kolere, minace. Kaj en la homamaso — kvazaŭ iu frapis ĉiujn korojn — okazis subita movado. Ĉiuj okuloj sin turnis ankaŭ tien, kaj la italoj levis sin sur piedfingroj, kunpremanie stajn malpurajn sunbrunigitajn pugnoj, etendante stajn formuskolajn brakojn.

La urbejo, kovrita per maldensa nebulo de propraj elvaporajoj, staris trankvila, kviete spiranta kaj daŭriganta sian ĉiutagan senŝanĝan vivadon. Sur la placo brue treniĝis vagono, ie en tunelo spirblovis rapidega vagonaro... Super la placo la vento pelis polvan nubon. La nubo kvazaŭ rubando, traboria de sunradioj, haltis ĉe la nivelo de tiu grandega ankoraŭ konstruata domo, simila al Babela turo. Super, meze de la trabaro kaj de la tabuloj kvazaŭ formikoj rampis konsilulaboristoj, kaj ĉiumomente grandaj pezajoj suprenleviĝis al ili, malaperante en nubo da polvo, dum malsupre gigantaj leviloj senbrue turniĝis, kaptante ĉiam novajn kaj novajn platformojn kun brikoj kaj granitblokoj.

(Daŭrigota.)

En la lastaj semajnoj komenciĝis novaj kursoj en Blitterfeld, Blankenese, Demmin, Friedland, Altona (Esp. fakultativa instruado ĉe la teknikaj ŝtataj lernejoj), Harburg (24. aŭg. por pli ol 100 infanoj, 5. sept. por plenkreskuloj), Ingolstadt (24 p.), Koblenz (du kursoj jam anonciataj en ET), Kreuznach (por 30 komercistoj), Leipzig (14 kursoj de Germ. Lab. As.), Leobschütz (3 kursoj), Mainz (pli ol 60 p.), Mannheim (kursoj, interalie unu por laboristoj), Neugersdorf, Rathenow, Recklinghausen (30 p.), Stuttgart-Cannstatt, Zittau (20 p. en la unua klaso de la komerca lernejo); finiĝis kurso kun 20 p. en Würzburg.

La komerca ĉambro en Königsberg rekomendis la fakultativan enkondukon de Esperanto.

Esperanto en Finnlando.

El la oktobra numero de „Esperanta Finnlando“ kaj el raportoj rekte ricevita el Finnlando ni elĉerpas jenajn sciigojn:

Ĉe Esp. Instituto de Finnlando funkcias 1 supera, 1 ekzercita, 4 elementaj kursoj kaj apartaj kursoj por unu societo kaj por la kompanio por konstruado de maŝinoj kaj pontoj. Entute anonciĝis 250 partoprenantoj.

Dum la krisinaska libertempo okazos en Helsinko ĝeneralaj kursoj por gvidantoj de t. n. stud-cirkloj. La kursojn aranĝos la ŝtata delegacio por publikaj lekcionoj (Valton luentolautakunta) je kosto de la ŝtato. Inter la studfakoj estos Esperanto kiel regula fakoj.

Krom la kursoj de la Esp. Instituto okazos kursoj en Helsinko (2 kun 80 p.), Viipuri (2 kun 131 p.), Lahli (Lab. Instituto), Turku (ĉe „Esp. Grajnero“), Oulu, Seinäjoki kaj Laihia. Esp. klubo de Laihia sendas kursgvidantojn al najbaraj parohoj laŭ peto. Tri petoj jam alvenis.

Akcia Soc. K. J. Gummerus (Jyväskylä) eldonis jam la 5-an eldonon de Esp. Gramatiko de H. Salokannel.

Dum septembro 18 finnlandaj gazetoj publikigis 45 artikolojn pri Esperanto.

Komerco.

Komerca Ĉambro de Königsberg (Germ.) rekomendis la fakultativan enkondukon de Esperanto.

Junularo.

Gejunulara Esp. Ligo en Bulgario fondiĝis laŭ iniciato de Karlov'a Ĝenerala Esp. Soc. „Ni venkos“, kies centro estis unue en Karlovo kun prov. administr. komitato (s-o Cvetan Cvetkov, f-ino Mari Dočeva kaj s-o Zah Bočev), havis la 17./18. aŭg. sian starigan kongreson en Plovdiv. La ligo estas branĉo de Bulg. Esp. Societo: Sidejo por la unua jaro estas Panagjuriste. La Ministerio por Publika Instruado jam oficialigis la novan organizaĵon (ordono n-o 4,444 de 22. 9. 21).

El pola esp. movado.

La manko de loko ne permesas al ni publikigi diversajn protestojn, kiujn ni ricevis, kontraŭ la agado de Pola Esp. Societo en Varsovo. Ni ankaŭ — kiel malproksime starantaj observantoj — ne povas kompetente (kvankam objektivaj) prigi la situacion. Tamen ŝajnas al ni ne bone, ke en Pola Esp. Soc. estu reprezentataj nur „pur-sangaj“ kaj katolikaj poloj; ĉar tio elvokas la fondon ankaŭ de samrajtaj hebrea, germana, rusa blankrutena, ukraina, litova, latva, ĉeĥa ktp. esp. societoj en Pola lando. La sekvo de tia certe ne esperanteca disigo de la fortoj estus malforta pola esp. movado, kiun ankaŭ la fondo de tutpollanda esp. kartelo de ĉiuj tiuj societoj (pola,

Requiem.

Verrakonto pri blinda muzikisto.

De Hjalmar Höglund.

El la sveda lingvo esperantigis Harald Thilander. (El „Esperanta Ligilo“.)

La vespero kuŝas malhela super la stratoj, sed la Engelbrekt-preĝejo, la belega templo supre sur la roko, briligas per lumo, ĉar hodiaŭ vespere estos donata la granda tonkreaĵo de la blinda majstro. Popolamasoj densiĝantaj iradas supren laŭ la ŝtuparoj internen de la templo, kaj seĝo post seĝo estas okupata ĝis la lasta loko. Ĉiu scias, ke „Requiem“ estos donata, kaj multaj scias pli multe: ili scias, ke tiun ĉi fojon la meso mortula estos korkaptanta ago de realeco.

Aŭtomobilo venas supren laŭ la deklivo, unu el la preĝejoj pordegoj vasten malfermiĝas, blinda viro sur malsanula seĝo estas enportata, kuraĉisto iras ĉe lia dekstra flanko kaj varistino ĉe lia maldekstra, la orkestro ĉesigas la agordon de la instrumentoj, la aŭskultantaro fariĝas senbrue trankvila, kaj iras tra la mensoj forta ondo de ekscitiĝo.

Kiu do estas la malsanulo, kiu estas la blindulo, enportata en la templon kun tiom da estimo? Li estas la mortanta muzikkomponisto, la blinda majstro.

Dum multaj semajnoj la morto staris en lia proksimo etendante al li sian manon, sed la majstro forpuŝis ĝin kun ĉia al li restanta energio. Ne, ne, kara amiko, atendu ion ankoraŭ, li diris al la morto, atendu, ĝis mi povos aŭskulti mian „Requiem“.

Kaj la morto estis komplezema, li atendis, kaj dume la ĥoro kaj la orkestro ekzercadis, kaj nun ĉio estas preta.

hebrea, germana, rusa ktp.) ne povus grave fortiĝi. La 1-a Konferenco de Polaj Esperantistoj, anoncita por la 30. okt. ĝis 2. nov., per lia diferencigo do fariĝos ne konferenco de tutpollandaj esperantistoj, sed nur de malgranda parto de ili, t. e. de la nacie kaj naciele polaj samideanoj. Plion ni ne diros, ĉar — kiel ni jam esprimis — ni ne opinias nin kompetentaj en tiu ĉi afero.

T. J.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

En Aleksandrio (Egipta lando)

fondiĝis esp. grupo. La adreso de la sekretario estas: G. Wilken, advokato, 4, Farahde Street.

La loĝantaro de la grava havenurbo estas tre diversnacia. Eĉ samfamilianoj, skribas s-o Wilken, ofte ne bone komprenas unu la alian, ĉar ne mal ofte okazas en familio, ke la edzo, ekzemple, estas franca, la edzino greka, servistino itala, servisto araba; filo lernas en angla lernejo kaj filino en germana. Komprenable, ke ili bezonas helpan lingvon por siaj internacie familiaj rilatoj.

Pro tio ĉiulandaj esperantistoj estas petataj sendi lernolibrojn kaj propagandilojn.

Esperanto dum franca kongreso de meti-lernado en Lyon.

Dum kunveno de 13. okt. s-o Julien Reynier, eks-komercluĝisto, hon. prez. de Lyon'a Meblindustria Sindikato kaj membro de Lyon'a Esp. Grupo, prezentis, je la nomo de la Nacia Federacio de la Meblindustrio, deziresprimon pri deviga instruado de Esperanto en profesiaj lernejoj. S-o Cunisnal, senatano, prezidanto, diris, ke la propono koncernas la kongreson de teknika instruado, sed esprimis sian favoran opinion, same kiel kelkaj aliaj oratoroj. Kvankam la rezolucio ne estis voĉdonata, tamen la fakto de la propono estas sufiĉe grava.

Esp. kursoj en Paris kaj ĉirkaŭaĵo.

En n-o 53 de ET estiĝis eraro. La kurso ĉe Labora Borso ne estas aranĝita de la Norda Sekcio de la Pariza Grupo, sed de la Revoluĉiema Esp. Pariza Grupo. Entute la Revoluĉiema Grupo anoncas jenajn esp. kursojn: lunde ĉe Bellevilloise, marde ĉe Intersindikata Komitato kaj ĉe Sindikato de la Librolaboristoj, merkrede ĉe 11-a sekcio de Komunista Partio (2 kursoj) kaj ĉe Sindikata Domo de la 13-a, vendrede ĉe Laboro kaj ĉe Sindikata Domo de la 15-a. — En Pantin ĉe Popola Universitato kaj ĉe Intersindikata Komitato, en Puteaux ĉe Revendikacio (?). Kursoj en Levallois, Courbevoie kaj Villemomble estas aranĝataj.

En Près-St. Gervais s-o Cuny gvidas kurson en Popola Universitato.

Gasto el malproksima lando en Budapeŝto s-o de Villa el Kuba insulo alvenis kun sia edzino la 18. okt. Je lia honoro la budapeŝta grupo de HES aranĝis festeton.

En Salzburg (Aŭstrio)

prof. d-ro Christianell instruas Esperanton en privata gimnazio „Borromäum“; la instruado estas libervola kaj kun speciala permeso de la landa lernejestraro.

La 17. okt. komencis nova klubkurso kun 32 partoprenantoj en ŝtata reallernejo.

Raporto de Esp. Kartelo Nürnberg-Fürth (Germ.).

La supera popollernejo en Nürnberg akceptis Esperanton kiel solan fremdlingvon (prelegoj de prof. Ledermann). Esperanto jam estas instruata ĉe la komerca supera lernejo, la supera reallernejo, reallernejo II, la urba progresigaj lernejoj, la komercaj lernejoj de unuĝo „Merkur“ kaj d-ro Sabel en Nürnberg, kaj ĉe la urba progresigaj lernejoj en Fürth.

La templo estas plenigata de majstre kunmetitaj bonsonoroj de ĥoro kaj orkestro. Tio ĉi estas verko monumenta, kreltaĵo perfekta de artisto favorita de Dio, kaj ĝi efikas per la forŝiranta potenco de forta tonento. La kuraĉisto palpas la pulson de la malsanulo. Ĉiu momento estas nervstreĉiga. Ĉu la mortanto postvivos sian propran mormeson, aŭ ĉu akordo potence levas lian spiriton sur sian tonondon kaj ĝin forportos en la eternecon?

Sed la majstro ridetas. Li klinetadas la kapon laŭ la bonkonataj ritmoj, kaj sur lia vizaĝo ripozas brileto de hela paco. Li sentas, li scias, ke la morto ne maltrankviligos lian solentagon, sed kiam ĉio ree silentos, kiam la lasta tonondo estos travibranta lian spiriton, tiam li estos preta.

La mezo finiĝas, la instrumentoj silentas, la kanto ĉesis, kaj la aŭskultantaro levigas en siaj lokoj kaj volas ekkriegi pro ĝojo pri la grandioza verko sed restas staranta en adorea senmoveco, konsciante, ke tio ĉi estas la finakto de neordinare korusanta tragedio, elportata kun anima grandeco senekzempla. Kaj dum regas la silento, la mortanta majstro estas elportata el la templo.

Requiem aeternam dona eis, Domine!

Mi lin memoras jam de liaj junaj jaroj. Li estis blinda jam tiam, sed tion li malmulte rimarkis. Estis en lia konduto io komike mallerta kaj sen-gracia. Li trapasis duadormante sian tagon, kaj nur kiam estis demando pri muziko, li tuteve ekinteresiĝis. Tiel li plenkreskis kaj maturiĝis kaj fariĝis viro laŭ sia propra speco. Li pasis sian ekzamenon en la musikakademio, daŭrigis sian edukigon ĉe konataj instruistoj kaj profundigis sian sciadon per propraj studadoj, fariĝis fine instruisto kun la tasko al aliaj blinduloj komuniki

La kartelo aranĝis sub la gvidado de la Saksia Esp. Instituto oficialajn esp. ekzamenojn. Ĉeestis delegitoj de la urbo kaj de la bavara instru-ministro. Dum la jaro 1921 la kartelo aranĝis 3 grandajn propagandajn paroladojn, je kiuj estis akceptataj unuanime deziresprimoj pri enkonduko de Esperanto en la lernejoj.

En Popola Altlernejo Forst (Germ.)

estis malfermata kurso pri Esperanto la 17. okt. Ĝis nun aliĝis 15 partoprenantoj. Gvidanto s-o Muthschall.

En Danzig

s-o Amort malfermis novan kurson la 25. okt.

Restarigo de Pola Esp. Soc. en Lodz.

La 1. okt. okazis la organiza kunveno de la Looz'a filio de Pola Esp. Soc. La kunvenon malfermis ing. K. Mikolajczyk, skizante en mallongaj vortoj ĝian historion. En la estraron estis elektataj: prez. d-ro Goldenberg, vic-prez. R. Meczynski, sek. A. Pilz, kas. ing. Wislawski kaj bibli. Drymer. S-ojn Fr. Ender (Wielun) kaj prof. Andr. Lipski (Warszawa), la iamajn prezidantojn kaj vicprezidantojn kaj unuajn pionirojn de Esperanto en Lodz, la kunveno unuanime nomis honoraj membroj de la societo. La duma sidejo de la societo estas ĉe str. Piotrkowska 55. Adreso por leteroj: Poŝt-kesto 209.

Ĉeĥoslovakio.

S-o prof. Trantschka faris la 1. okt. paroladon en Hohenelbe, kaj s-o Mayer el Goldenbols aranĝis ekspozicion. Meze de oktobro, en H. komenciĝis du kursoj gvidataj de s-o prof. Böhm kaj f-ino N. Pickert. Ĉiu kurso havas 20 partoprenantojn. Ankaŭ en Trautenau komenciĝis kursoj.

Stranga konduto.

La 30. sept. s-o Goltz, ĉefo de la firmo Sigmund Goldschmiedt en Reichenberg (Ĉeĥoslovakio) faris paroladon por ldo. Stranga estas la fakto, ke la firmo de s-o Goltz faras propagandon per Esperanto (anoncoj en „La Marto“).

Gazetaro.

FRANCAJ GAZETOJ.

SUD-EST REPUBLICAIN, Lyon, 11. 9. (ĉefartikolo de s-o P. Clerget, dir. de la Supera Komerca Lernejo de Lyon „La rajtoj de Esperanto“).

PETIT JOURNAL, Paris, 20. 10. (Responde al du malfavoraj artikoloj, granda artikolo de s-o Archdeacon „Esp. estas tre akordebla kun patriotismo“, kun favora prezento de la redakcio).

HUMANITE, Paris, 16. okt. (Granda favora artikolo de socialista verkistino Severine).

LE POPULAIRE DU CENTRE, Limoges, 18. okt. (Reprezenta artikolo el „Humanité“ kun favora enkonduko).

GERMANAJ GAZETOJ.

RHEINISCHE ZEITUNG, Köln, 16. 10. (Artikolo pri ldo de H. Peus, facile refutibla.)

STADT-ANZEIGER, Köln, 26. 10. (Noto.)

ALILANDA GAZETARO.

18 finnlandaj gazetoj publikigis dum septembro 48 artikolojn pri Esperanto.

HOLANDA PIONIRO raportas en sia n-o de oktobro, ke dum la monato septembro aperis 78 artikoloj pri Esperanto en 84 nederlandaj gazetoj.

Laŭ peto de s-o G. van Heek en Hengelo eskvanta nederlandaj gazetoj publikigis artikolon pri Internacia Labor-Oficejo (per Esperanto): Twentsch Zondagsblad, Almelo; Nieuwe Hengeloache Courant, Hengelo; Hengeloache Courant „Twenthe“, Hengelo; Onafhankelyk Weekblad, Almelo; Provinciale Overysseleche Zwolsche Courant, Zwolle; Twentsch Dagblad „Tubantia“ en Enschedeache Courant, Enschede. Enschede's Advertentieblad en Enschede presis nur la lastan frazon, certe prentitan el alia gazeto.

BELGA ESPERANTISTO de julio-aŭgusto sciigas, ke aperis multaj favoraj artikoloj pri Esperanto en la belga gazetaro. DANZIGER WIRTSCHAFTSZEITUNG, Danzig, 25. 9. 21. (Favora artikolo de s-o Ketterling: La signifo de la mondlingvo Esperanto por la komercistaro.)

EL ARTESANO, Barcelona, Hisp., okt. (Artikolo pri Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberaj Landoj.)

siajn proprajn scipovojn muzikajn, kaj kiel instruisto li mortis.

Dume li estis komencinta muzikverkadon, kaj tiam, nur tiam, ekestis al li tute klara tio, kion signifas la vorto *blinda*. Ĝi ĉiam estis al li malĝoja kaj neagraba vorto, kiu estis kvazaŭ enstampita sur liajn okulojn, sed kiam li komencis muzikverki, ĝi ekhavis la signifon de io ankoraŭ pli malbona, io paraliziga, terura, ĝi efikis kvazaŭ neevitebla, flimiga inkubo, kiu ligis lian menson malsupren kaj enfermis lin en malvastajn, el kie li ne povis atingi la eksteran mondon. Tial li malĝojis neesprimeble pri sia blindeco; ĉar, vi ja scias, ke al animo artisto la sufero estas pli intensa ol al aliaj homoj, estas la ĉielo pli belega kaj la infero pli terurega ol al aliaj animoj.

Kantils muziko interne de li, li aŭdis en sia animo siajn formitajn akordojn, aŭdis ĉiun tonon kaj ĉiun tonnuancan, sed kiamaniere ĝin surpaperigi? Li devis streĉeigi sian memoron, li ne riskis tute lasti unuan verkon por komenci novan pro la timo forgesi. Li estis kvazaŭ ĉiam graveda kaj ne povis naski. Tiam li faris finē decidan paŝon.

Eble lin pells amo, eble nur malespero pri sia blindeco; — kiel ajn, li akiris per edziĝo la vidon de paro da okuloj.

Trankvile kaj senpretende poste laboris la du. Noton post noto diktis li el la memoro, kaj noton post noto skribis sur la paperon lia edzino, kaj tiamaniere estis savataj por la postvivontaro lia „Requiem“ kaj aliaj komponaĵoj. Tiu ĉi tempo estis hela tempo al la blinda majstro. Li sentis, ke kreskas lia homvaloro, ĉar nun li estis savita, kaj pordo estis malfermita por li al la ekstera mondo, kaj li ĝojis pro tio, kiel ĝojas bona infano. Lia artista spirito vekigis, pro nova

LA PATRIA, ĉiutaga de Oruro, Bolivio, 6. 8. Enhavas artikolon de 8 kolonoj pri Esperanto, de Modesto Millán G., Casilla 40, Oruro. Ni tre ĝojas pri tiu signo de esp. movado en la sudamerika ŝtato Bolivio. Espereble s-o M. povos daŭrigi sian propagandon.

IL VENETO, Padova, Italio, 17. 9. (Esp. kaj nacionalismo.) IL RESTO DEL CARLINO, Bologna, Italio, 6. 10. (Artikolo pri Esp. de d-ro Toschi.)

KURJER LODZKI, Lodz, Pol., n-o 265. (Noto.) SWIAT PRACY, Warszawa, Pol., 15. 10. Proletaria gazeto, enhavas flaman artikolon pri Esperanto.

DELMAGYARORSZAG, Kaposvar, Hung., 16. 10. (Traduko el ET: Letero el Pollando.)

WABA MAA, Tallinn, Estonio, 5. 10. (Traduko el ET: Kio anstataŭos la karbon?)

La manko de loko

en ET neniel malaperis per la pli grandigo de la formato; ĉar — kun la kreskanta intereso por nia jurnalo — ankaŭ kreskas ĉiusemajne la amplekso de la manuskripto. Estas neeble presigi ĉiujn, nur ĉ. trionon ni povos publikigi, kaj el tiu triono la pli granda parto devas esti grave mal-longiĝeta. Raportojn pri okazintaĵoj de antaŭ 6-8 semajnoj ni tute ne konsideras, same negravajn alvokojn ni rifuzas. La loko en ET apartenas al la tuta esperantistaro, ne al iu aŭ alia aplombema persono aŭ societo. Tion konsideru ĉiu.

Novaj Abonejoj de ET.

En SVEDA lando: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
En BELGIO: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.

Internacia Presa kaj Eldona Societo.

En n-o 46 la ĉefredaktoro de ET skizis projekton pri fondo de Internacia Eldona Societo sur la bazo de ET. Intertempe la afero jam progresis. Ĉar ni povas lui taŭgan elon, ni ne bezonas aĉeti domon, kaj la minimuma kontanta kapitalo bezonata nun estas 200 000 mk., el kiuj 70 000 mk. jam estas cerligita, krom la sumoj enpagitaj de la kuneldonantoj.

La societo verŝajne eldonos akciojn aŭ sulkdatestojn po 1000 mk. Se ĝi eldonos sulkdatestojn, ĝi garantios profiton de 6 % kaj prezentos la ŝancon de premio de pliaj 2—3 %, laŭ la progreso de la entrepreno.

Eble, en venonta numero, ni povos doni pliajn detalojn.

Samideanoj, kiuj intencas aĉeti unu aŭ kelkajn atestejojn de la fondota entrepreno, bonvolu jam nun — tute sen devigo — komuniki al la administrato de ET, kiom da atestejo po 1000 germ. mk. ili eventuale deziras aĉeti.

Al Vi, ho Suno!

Vidu, kiom suferas mi
En la nokto malklara!
Kial ne ekleviĝas Vi?
Ho levigu, Vi kara!

Brilu, Suno, ho brilu Vi
Lumigante la ĥoron,
Kaj forigu de tie ĉi
Tutan noktan doloron!

Kaj varmigu, ho Suno Vi,
Mian bruston malvarman,
Donu al malfeliĉa mi
Ĝojan vivon pli ĉarmant!

Varma Järvenpää,
blinda esperantistino.

vivemo, kaj novaj, potencaj akordoj komenciis sonori interne de li. Li denove estis la majstro kreanta. (Finota.)

Premi-Enigma.

(La solvo estos publikigita post unu monato. Solvintoj sendu samtempe kun la solvo minimume 0,50 cis. aŭ 5 gmk. por „Esperanta Ligilo“. El la solvintoj tri ricevos la belan memorlibreton „Lastaj Tagoj de D-ro Zamenhof“, preltan sur luksa papero kaj riĉe ilustritan.)

a a a al cy de de de der dur er es ger gu
ho i in is ja kin la la la li li ma ma ma man
nan nel ness o om pe re ri ro ron rum san sen
tan te to to ver ze

Oni kunmetu la silabojn tiamaniere, ke rezultos 15 urboj en jenaj kontinentoj: 1. Azio, 2. Okcidenta Eŭropo, 3. Azio, 4. Meza Eŭropo, 5. Suda Ameriko, 6. Afriko, 7. Eŭropo, 8. Norda Ameriko, 9. Aŭstralio, 10. Suda Ameriko, 11. Afriko, 12. Meza Ameriko, 13. Nord-okcidenta Eŭropo, 14. Azio, 15. Afriko.

La komencaj literoj de la urbnoj, legataj de supre al malsupre, nomas esp. gazeton, kies ekzistado estas minacata.

Humoro.

Nia juna Esperanto-entuziasmegulo demandas sian ĉarman akompanantinnon, kun kiu li konatiĝis en la danckurso, dum ilia unua komuna promenado: „Nu, fraŭlinito, ĉu vi ne jam scipovas Esperanton?“

„Ne, sinjoreto“ ŝi resprndas, „mi nur scipovas One Step'on, Two Step'on, Boston'on kaj Valson!“

Sendu ankoraŭ hodiaŭ vian donacon por „Ligilo“!

Parolejo.

102. Poŝtaj Rilatoj al Rusio.

Mi legas en ET pri korespondado per ilustritaj poŝtkartoj kun rusaj samideanoj; sed en la „Post Office Guide“ Britujo por aŭgusto 1921 mi legas p. 649, ke pentraĵoj, desegnaĵoj, skizoj en kiu ajn maniero produktitaj estas malpermesataj por Ruslando, kaj ke ne riceveblaj artikoloj estas konfiskeblaj. La esceptoj al malpermesoj rilatas al reproduktado de rusaj kaj reproduktadoj en fremdlingvaj libroj kaj ĵurnaloj.

Cu tiuj poŝtkartoj tamen alvenis? Kelkfoje oni kredas, ke internacia korespondado kaj interŝanĝado de poŝtkartoj ilustritaj k. c. kaŭzas pli da malbona ol bona sento, pro oraroj kaj nealvenoj, nerepondoj.

(Ch.-G. St.-M., London.)

Recenzejo.

(Unuope senditajn librojn ni mencias, duoble senditajn ni recenzas. Monataj esp. gazetoj sendu du ekzemplerojn interŝanĝe kontraŭ unu ekz. de nia semajna ĵurnalo.)

LIBROJ.

TRA LA MONDO. Internacia legolibro. Kolektita kaj prilaborita de Paul Bennemann. 1-a parto: Por komencantoj. Kun multaj bildoj kaj muziknotoj 18 x 22 cm. 96 pĝ. Eldonejo: Ferd. Hirt & Sohn, Leipzig, Esperanto-Pako. Prezo bone karton. 10 germ. mk.

Jen vere bonega verko, valora plirliĝo de nia literaturo instrufaka. La nomo Bennemann, kies traduko de „Gygges kaj lia ringo“ estas fame konata, garantias la bonecon kaj taŭgecon de l' verko.

Ĝi estas komplemento de ĉiu lernolibro, kaj malgraŭ sia facile komprenebla stilo, tre interesa kaj multflanke uzebila. Kvankam ĝi estas destinita precipe por la junularo, ankaŭ plenaĝaj personoj trovos en la libro sufiĉe da interesajoj. Belaj bildoj kaj vinjetoj ornamas la paĝojn; la prezo kaj papero estas tre bonaj; zorgeme kompilita materialo de la leĝaĵoj kaj lerta aranĝo faras agrablan impreson.

La ses ĉapitroj ampleksas abundajn riĉaĵojn: proverboj, aforismoj, interesajoj el vivo kaj sciencoj, fabeloj, fabeloj kaj rakontoj, ŝercaĵoj kaj „multkolora“ angulo por liberaj horoj.

Tre ofte tiaj legolibroj enhavas tiom da infanaĵa, malnova materialo, ke ne valoras elspezi monon. Sed la libro de B. pravas, ke serioza, diligenta laboro produktas frukton maturan, se la penado estis laŭcela kaj subila.

Lingvo kaj stilo estas modelaj en la libro. Bagatelajojn mi ne mencias. Mi nur prefere skribus Bialystok anstataŭ Bjalostok parolante pri pola (ne rusa) urbejo.

Gratulante la aŭtoron kaj la eldonintan firmon, mi esperas, ke „Tra la Mondo“ fakte disvastiĝos — tra la mondo! (G. Aju.)

LA KOBOLDO ONDRA. De Jiri Mahen. El moderna ĉal. literaturo trad. Esp. Rondeto en Olomouc. Havebla ĉe Jar. Mastny, komercisto, Olomouc. Formato 10 1/2 x 14 cm. 40 pĝ. kaj kovrilo. Prezo afr. 4,50 kĉ. aŭ 4 resp.-kup.

„Tiu ĉi traduko estas dediĉata al amantoj de la delikata animo infana“. Tiu ĉi klarigo, donita en la libreto mem, jam montras ĝian karakteron, kaj mi ne bezonas ekstrakti la enhavon. Speciale mi volas latidi ĝian preson, kiu estas moderna kaj arta; precipe la ruĝaj inicialoj aspektas bele kaj arte. Kvankam la traduko de la ĉarma rakonto enhavas kelkajn gramatikajn kaj ankaŭ diversajn presararatojn, mi volonte rekomendas la verketon speciale al amantoj de arte aranĝitaj libroj. (R-ano.)

GAZETOJ.

AGITANTO, n-o 5-4. Kronstadt, Rus., Viaokaja ul. 27, loĝ. 2. En rusa kaj esp. lingvoj.

BELGA ESPERANTISTO. Julio-aŭg. Raporto pri la XIII-a. La XI-a Belga Esp. Kongreso okazos dum Pentekosto 1925 en St. Nikola (Waaas).

ESPERANTA FINNLANDO. Okt. Kun ilustr. artikolo „Laŭdkantaro al la Lago“ kaj kun acilgoj pri la XIV-a. Abonejo: Kasarminkatu 20, Helsinko.

ESPERANTO-PRAKTIKO. Okt. Literaturo. — Raporto. — Lingvaj Demandoj (Fizikaj grandoj kaj iliaj unuoj, de Eugen Wüster).

ESPERANTO TEZOZOFIA. N-o 1. Sept.-okt. Revivigita organo de Teozofia Esp. Ligo. Red. kaj adm.: V. Cimr, Krakovska ul. 17, Praha II.

FRANCA ESPERANTISTO. Sept.-okt. Esperanto kaj Societo de Nacioj. — Pri la XIII-a Kongreso. — La projekta Ligo, ktp.

GERMANA ESPERANTISTO. Okt. Bonegaj artikoloj de d-o Sieche kaj aliaj. — Vasta kroniko. — Instrua kaj literatura parto. — GEA konsistas nun el 182 grupoj kun 5500 membroj.

KATOLIKA MONDO. N-o 2. Kun detalaj raportoj pri la lka-konferencoj en Graz.

LA HOLANDA PIONIRO. Okt. LA PROGRESO. Okt. Raporto pri la XIII-a. LA VERDA OMBRO. Aŭg. LE CUIR. (L' Index des Industries du Cuir.) Paris, okt. Tre grava franca revuo por la leda industrio, kun artikoloj en franca, angla, hispana, germana kaj esperanta lingvoj.

VERDA UTOPIO. Sept. Kun bildo „Oni dancas“. ESPERANTIDA. Okt. BULLETIN Français-Ido.

Anoncetoj.

ESTONIO. Esperanta oficejo petas pri elsendado de specimenoj de esp. ĵurnaloj kaj aliaj esperantaĵoj kun komunikado de kondiĉoj por opa vendado. Bezonas same katalogojn (en la ajn lingvo) pri agrikulturaj maŝinoj ĉiuspecial, de traktoroj kaj ventmotoroj ĝis inkubatroj kaj buiermaŝinoj. — Estonio, Vazalemo, H. Janver.

S-o N. A. HENDLER en Bydgoszcz, Pol. Sendu al mi klaran adreson, ĉar leteroj senditaj de mi al vi revenis ne trovinte vin. — Sulo Lehtinen, Laihia, Finnlando.

LIBRO-AMANTOJ ATENTU! Kiu estas amanto por antikva Luther-biblio, presita en 1585 de Hans Lufft? Prez-proponojn al Marg. Schoske, Breslau, Germ., Schweidn. Stadigraben 1 (65).

ANONCOIN por estonaj gazetoj kaj ĵurnaloj, disvastigadon de personoj kaj ofertojn en Rusio prizorgas Esperanto-oficejo Vazalemo, Estonio. Almetu respond-kuponon.

TEKSAĴOJ. Samideanoj aĉetas teksaĵojn ĉe Otto Meister en Ronsdorf, Germ. Petu proponojn.

19 FOTOGRAFAĴOJ de la XIII-a por 36 ĉ. kronoj riceveblaj ĉe Jiri Frankenberg, del. UEA, Bytĉica u Zillny, Slovakio.

„BES-a ADRESARO de Esperantistoj el ĉiuj Landoj“, 5-a eldono, kun 1000 adresoj kaj ilustraĵoj, estas ricevebla ĉe la eldonanto „Bohema Esperanto-Servo“, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov., por 10,50 germ. mk. aŭ 7 resp.-kup.

RUSIO. Esp. Sekcio de fako de popola klerigado en urbo M. Viŝera petas ĉiujn esp. redakciojn elsendadi al ĝi eldonatajn de ili ĵurnalojn kaj gazetojn; la sekcio rekom-pencos per elsendo de siaj eldonaĵoj. Adreso: Esperanta Sekcio, Maleja Viŝera, gub. Novgorod, Rusio.

ĈIUN NOVAN ESP. LIBRON kaj aliajn esperantaĵojn sendu kun notita prezo al esp. vendejo „Bohema Esperanto-Servo“, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov.

PLUMDESEGNAĴOJ, motivoj de Praha ktp., proksimuma formato 17 x 25 cm, prezo 40-60 kĉ. Poriretoj per karbo desegnitaj de 100-200 kĉ. (20 x 30 cm). Proponoj por esp. glumarkoj. — Georgo Bohutinsky, pentristo, Praha II, Palackeho nabrezi 1672-56 n.

GEJUNULOJ! Manuskripto rondiranta estas fondata. Gejunuloj verkemaj sin turnu, aldonante se eble poŝtm. por respondo, al H. Seppik, Tallinn, Manesi 7-12, Estonio.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Kiu pola samideano interŝanĝus kun mi la „Tygodnik Ilustrowany“ kontraŭ la ajn germana ĵurnalo semajna? B. Wachowski, Essen-Dellwig, Kraienbruchstr. 63 a, Germ.

S-o A. Schutsky, 8015 Lyons Ave., Philadelphia, Pa., Usono, deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Ad. Houben, Kattenberg 28, Borgerhout, Antwerpen, Belgio, deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj lando.

Haapsalu, Estonio, A. Kook, Kalda St., interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Helmi Drezen, Tallinn, Estonio, poŝtekesto n-o 6, pro trookupateco estas ofte devigata atendigi ĉiujn skribintojn al 81. Si petas pardonon sin kaj acilgas, ke si tamen nepre respondos al ĉiuj.

S-o Johannes Tamverk, Karja 5, Haapsalu, Estonio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bilditaj) nur kun fraŭlinoj.

Matti Avinen, Kurekka, Finl., deziras korespondi per leteroj kaj kartoj kun samideanoj el ĉiuj mondpartoj, esceptite Germanlando.

F-ino Aura Leino, Instruistino, deziras interŝanĝi vidaj-kartojn (bfl.) kun ĉiuj landoj. Adreso: Wilpuri, Finnlando, Alonkatu 26.

S-ino Eeva Leino deziras interŝanĝon de ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj. Adreso: Wilpuri, Finnlando, Alonkatu 26.

S-o Kust. A. Leino, kontrolisto, interŝanĝas „aloalojn“, poŝtmarkojn, monerojn kaj monbiletojn, ankaŭ ilustr. poŝtkartojn. Adreso: Wilpuri, Finnlando, Alonkatu 26.

S-o E. Siltanen, librotenisto, fraŭlo, deziras interŝanĝon de ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandaj samideanoj. Adreso: Wilpuri, Finnlando, Pilsankatu 6-as. I.

Anatolio Lahovskij, 14-Jara, Petrograd, Rusio, Zabalkanskij 20, deziras korespondi france, ruse kaj germane per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. kun eksterlandanoj pri ĉiuj temoj.

S-o Benjamin Nasielski, lernanto, Graniczna 8, Warszawa, Pol., korespondas kaj interŝanĝas poŝtmarkojn.

Kiu deziras aĉeti bonan poŝtmark-kolekton de Meza Litovio (de generalo Zelgowski), skribu al S. Giller, Wilno, ul. Akademicka 5/42. Mi sendas 66 malsamajn pecojn por kvin (5) francaj frankoj.

John Tew. Eyck-Hinkel deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj. 2520 Channing Way, Berkeley, Kalifornio.

Vicente Orlando, Santa Fé 77, Bahia Blanca, Argentino, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo, kaj korespondi pri ĉiuj temoj kun fraŭlinoj.

S-o Josif Polcsan, poŝt-telegraf-oficisto, Ĉiuj, Transilvanio, Rumanio, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj, kun fraŭlinoj pri ĉarmaj aferoj. Mi ŝanĝos fotografiaĵojn.

F-ino Collignon, 10, rue Faurel, Paris 18, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-ino Chauller, 110, rue de Sèvres, Paris 15, interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-o Cugliolo Jean, 5 Avenue de la Liberté, Courbevoie (Seine), Franc., interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Ing. Leopold Berger, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov., interŝanĝas poŝtmarkojn, poŝtkartojn, esperantaĵojn; kolektas adresojn por sia „BES-a Adresaro“.

D-ro Lajos de Györy Nagy, advokato, del. de UEA, acilgas alajn gekorespondantojn pri sia transloĝigo al Mezĉsot, Hungario, kaj petas ilin bonvole daŭrigi la ŝanĝadon de leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj.

S-o Julio Környei, Budapest VII, Dob u. 108-1-6, deziras korespondi kun ĵurnalistoj kaj oficistoj pri kontumaj kooperativaj temoj kun ĉiuj landoj.

F-ino Olga Nemessanyi, 15-jara studentino, Imre utca 4, Miskolcz, Hungario, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn.

S-ino D-rino Johano Gozon Fodor, kuracistino, Miskolcz, Hungario, deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj kaj amikaj leteroj precipe kun eksterlandanoj.

S-o D-ro Gozon Oeza, kuracistino, Miskolcz, Hungario, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun seriozuloj, precipe kun Rusio, Litovio kaj ĉiuj balkanaj ŝtatoj; volonte interŝanĝas ankaŭ kun aliaj eŭropaj ŝtatoj. Interŝanĝo nur laŭ mankolistoj.

Emeriko Lengyel, Budapest VIII, Kalvaria-ter 18, Hungario, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj, leteroj kaj poŝtmarkoj kun ĉiuj landoj.

S-o B. Szepessy, Hungario, Miskolcz, Arany J. u. 29, interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo. — Por 100-200 poŝtmarkoj mi donas saman kvanton da hungaraj poŝtmarkoj aŭ povas rekomenci laŭ la valorigo de l' katalogo Sent 1921, Michel 1920 (por eŭropaj poŝtmarkoj) kaj J. et T. 1920. Difektaj poŝtmarkoj estas maldezirataj. Unufoje sendi mi ne povas, sed nepre rekomencos ĉiujn sendintojn.

S-o Bela Juki, X. Hölgy-u. 48, Budapest, Hung., deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandaj fraŭlinoj kaj kun Japanio.

Monteys & Martinez, Barcelona (Hispano)

Comercio 31-3-2.

Ni aĉetas je nia propra kalkulo kaj komisio germanajn kaj aŭstrajn komercaĵojn. Estas preferindaj la jenaj artikloj:

- Malplenaj kverkbareloj. :: Kverklignaĵoj. :: Diamantoj kaj brilantoj.
- Oraĵoj. :: Artikloj por aŭtomobiloj. :: Materialoj por aŭtomobil-kaleŝoj. :: Horloĝoj. :: Ledoj, silkaj ŝtrumpoj kaj ŝtrumpetoj por sinjorinoj kaj sinjoroj. :: Tolaĵoj kaj teksaĵoj. :: Vitro kaj trel plu.

Horloĝoj ĉiuspecial

poŝ-vekhoroĝoj, malgrandaj vekhorloĝoj, star- kaj murhorloĝoj en plej bona kvalito. — Demandu prezaron! — Rezentantoj serĉataj.

HERMANN TOBUSCH, horloĝ-eksporto, Freiburg i. Br. Kaiserstr. 16. (Germanio.)

MEKANIKA LIGNOTORNEJO

Emil Schwörer, Freiburg i. Br., Germ. Dreikönigsstr. 47

eksportas lignajn biciklo-tenilojn glatajn kaj kanelitajn en plej bona kvalito kiel specialaĵojn al ĉiuj landoj.

Reproduktadoj kaj originalaj specimenoj estas volonte sendataj.

Rezentantoj serĉataj.

Komercdomoj, Komercistoj, Rezentantoj

uzu en via propra intereso la servojn de la

Komercista Esperanto Grupo Freiburg i. Br., Germ., Katharinenstr. 14

kiu havas bonegajn rektajn rilatojn al gravaj germanaj firmoj kaj fabrikoj. Perado senkoste!

ESPERANTISTA VOĈO

en Jaslo (Pollando) liveras ankoraŭ:

- Batucki, Ama bileto mk. 3.-
- Orzeszko, A. B. C. 5.-
- Elski kaj Eska, Unuaj agordoj 6.-
- L. Belmont, Sonoj Esperantaj, bnd. 8.-
- Mickiewicz, Sinjoro Tadeo 20.-
- Kabe, Internacia Krestomatio 10.-
- Jarkolektoj de „Esp-ista Voĉo“, po 5.-

Prezoj en germanaj markoj; por rek. poŝtel-spezoj aldonu 2 mk. Mono pagota aŭ al poŝtekkonto Leipzig n-o 89775 aŭ en bankbiletoj rekte al Salo Grenkamp-Kornfeld en Jaslo, Pol.

Kiu helpos?

Apartenante al la nuntempe tiom kompatindaj malgrandaj rentuloj, mi serĉas daŭran restadon kaj okupadon pri librotenado, korespondado aŭ lan konfidoficon en komerca aŭ privata domo. Mi ja estas lora maljuna, sed sana, tre vigla kaj laborema; aparta honorario ne estas postulata. Ankaŭ kiel zorgema gubernisto mi kapablas funkcii.

Bonvolu vin turni al la redakcio de ET sub A 1.

Malkaraj Mebloj.

Korbmebloj riceveblaj el pola fabrikejo pogranda kaj detale. Kompletaj salono, konsistanta el 6-10 pecoj (tablo, sofo, du foteloj, du seĝoj, unu tabor-eto, du florpedestaloj kaj unu florujo) kun plenk-pako kostas 240-315 frankojn sv. antaŭpagotajn per kia ajn bankofico — loko pola limo. La firmo posedas permeson oficialan liveri siajn fabri-kaĵojn en ĉiujn ŝtatojn. Informojn donas kaj mendojn akceptas (tri fotogr. desegnojn nur kontraŭ elsendo de unu sv. fk.)

Prof. Miecz. Sygnarski, Bydgoszcz, Kordeckiego 19. Ilp. Polonio.

SILKAJ BRODAĴOJ

REKTE EL ĤINUJO, LA SILKOLANDO!

Esperanto-brodaĵo kun surskriboj esperantaj, verda stelo, globo ktp.

Bibliaj brodaĵoj kun sanktaj tekstoj. 15 x 20 aŭ 29 x 39 cm • dol. 2.50 aŭ 4.50.

Brodaĵoj de birdoj, floroj, vidaĵoj ktp. samformataj kaj samprezaj.

Specialaj laboroj laŭ modelo.

Sendo per rekomendita letero.

Dol. 1.00 = 10 stamp. respond.-kup. aŭ 3 ŝilingoj, poŝtmandatoj aŭ kambioj de Thos. Cook & Son.

Specimeno kontraŭ 1 resp.-kup.

C. S. Gee, HAI-YEN (tra Shanghai), Ĥinujo.

Korespondado en Esperanto!